

Citaĵoj el TREZORO, III

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-003-B-1, 1990.12.29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Por la lasta fojo ni raportas al vi pri la libro **TREZORO**, kiu registras prozajn specimenojn de cent esperanto-verkistoj. Kiel ni jam diris, tiun antologion de la **esperanta novelarto** ni ŝuldas al la redaktado de Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ.

Cl.- Jen hodiaŭ ni laŭtleĝos dialogon, kiun verkis Zora HEIDE. Ĝi estas titolita **Egal-rajto**. La personoj estas: edzo kaj edzino.

A.- Ŝi (forĵetante tekono, deprenante mantelon) Bonan tagon!

Cl.- Li (serveme prenas la forĵetitajn tekono kaj mantelon kaj metas ilin sur iliajn lokojn) Bonan tagon!

A.- Ĉu manĝo estas preta? (eksidas, foliumas gazeton).

Cl.- Atendu nur kelkajn minutojn. Hodiaŭ mi havis grandan laboron. Mi lavis vestaĵojn.

A.- (kolere): Bone, bone. Mi laboras sange por enspezi sufiĉe da mono por vi, kiu dormas longe matene - kaj ripozas la tutan tagon.

Cl.- (humile): Nur tre malofte mi malfruas.

A.- (firme): Ĉu tre malofte vi ne ricevas la monon ĝustatempe?

Cl.- (humile): Ne, sed ĉiam al mi mankas mono. La prezoj ĉiutage plialtiĝas, kaj tamen vi ĉiam postulas ke mi ŝparu. Mi bezonas novan ĉemizon: vi promesis al mi jam antaŭ longe ĝin aĉeti.

A.- (firme): Jes, sed vi ne bezonas novajn vestojn kiel mi. Vi ja estas hejme; malnovaj vestoj konvenas por hejma laboro. Nia najbaro estas tute alia. Lia edzino rakontis al mi, kiom li ŝparas de la mastrumada mono. Kaj li estas tute kontenta ke li ne bezonas labori. Mi aĉetis aŭtomobilon kaj vi havis la eblecon ofte kunveturi. Nun mi bezonas novan aŭton.

Cl.- (fariĝas gaja kaj vigla): Ĉu mi povas ricevi la malnovan? (petante) Donu al mi monon por akiri permesilon por veturigado!

A.- (ironie): Mi ne opinias, ke via ideo estas bona. Ĉu vi ne legis en niaj gazetoj, ke psikologo klarigas la fakton, ke viroj ne taŭgas por nia nuna ampleksa tekniko. Multaj trafik-akcidentoj estas kaŭzataj de konfuzaj viroj. Fakte estas, ke ni virinoj ne kapablas fari bonan hejmlaboron. Ĉu vi ne estas kontenta, ke vi faras mastruman laboron?

Cl.- (komencante defendi sin balbute, sed eksonoras telefono) Mi... mi...

A.- (levas la aŭdilon): Halo! Saluton, kion vi diris?... Kunveno? Kiam? Vespere? La vivo estas terura. Laboro de mateno ĝis vespero. Kie?... Bone... Kion?... Dimanĉon... Denove... kaj poste festo... (fariĝas gaja)... Junaj?... (al la edzo) Pardonu, estas ŝtata sekreto, eliru momenton

Cl.- (obeeme): Jes, mi iros. (haltas malantaŭ la fermita pordo kaj aŭskultas).

A.- (daŭrigas sian telefonan babiladon, iom mallaŭtigas sian voĉon): Praktika konkludo: edzoj ne sciu ĉion. Ĉu venos ankaŭ ĉarmaj junuloj? Refreŝiga estos diskutado kun aliaj, kiuj ne parolas nur pri hejma laboro, ŝparado kaj infanedukado. Ĉu vi konsentas?... Pardonu momenton! (ŝi vokas sian edzon) Petro...

Cl.- (eniras post iom da tempo, liaj vizaĝtrajtoj montras naivecon) Manĝo estas preta.

A.- Mi devas transdoni al vi saluton de Eva. Vi certe aŭdis. Hodiaŭ vespere ni havos kunvenon, ankaŭ la venontan dimanĉon, poste feston, sed mi certe estos ege laca, tiel ke mi tuj revenos hejmen. Festoj enuigas min, maljunuloj kun sia babilado pri kormalsanoj kaj pri aliaj stultaĵoj. Ho, kiom ofte mi sopiris al nia hejma idilio, sed kion fari? Pro mono oni oferas sian vivon kaj sian tempon. (Tre milde al la edzo:) Venontan lundon mi aĉetos por vi novan ĉemizon, la plej modernan koloron kaj la plej elegantan modelon, ĉar vi ja estas mia tre kara edzo. Kelkfoje vi kolerigas min, sed tia ja estas la vivo.

Cl.- (gaje): Ĉu mi akompanu vin? Antaŭ nelonge mi vidis en la urbo belegan ĉemizon.

A.- (severe): Ĉu vi ne havas konfidon al mi? Post mia laboro mi aĉetos ankaŭ aliajn bezonaĵojn, kaj ĉu vi forgesis, ke lunde vi devas fari la grandan purigadon, por ke la domo estu preta por akcepti gastojn? Vi scias, ke reprezentantinoj de la instituto por plibonigo de la viraj kondiĉoj organizas la feston ĉe ni; estas ja ĝia miljara ekzisto, kaj mi estas protektantino. Vi havos eblecon diskuti pri viaj problemoj.

Cl.- (apatie): Jes, ni iru manĝi. Vi ĉiam pravas.

A.- (ŝi foriras).

Cl.- (parolante al si mem) Pro la diabla hejmlaboro mi havas nek monon, nek tempon por fondi institucion, kiu batalu por vira egalrajto. Jes, ni estas katenitaj, sed Dio gardu ĉiun edzinon, kiam la libereco alproksimiĝos. (eliras kuraĝe kaj triumfe).

A.- Per tiu teksto de Zora HEIDE ni konkudas la laŭtleĝon de prozaĵoj cerpitaj el la duvoluma verko **TREZORO**. Kaj el la **antaŭparolo** ni vidu kion Henri VATRÉ diras pri la kompilado de la tekstoj, kiun li faris kun Reto ROSSETTI:

Cl.- "Nia kompilado estas samtempe rememoro, spegulo de la nuno kaj vojmontrilo por la estonto, do, ne nur retrospektiva, sed ankaŭ perspektiva. La leganto konstatos nekontesteblan riĉon kaj varion en la diversaj pecoj, sed mankon de ĝenerala gvidlinio kaj foreston de skoloj.

A.- Niaj prozistoj ŝajne ignoras unu la alian. Ĉiu verkas "por si", kreante propran stilon kaj manieron. Neniu havas imitanton, eĉ ne la plej admirataj, krom eble en pastikaĵoj! Neniu emis paŭsi modelon pli frue sukcesintan.

Cl.- Ĉu tial ke ĝis nun nia literaturo ankoraŭ tro junis, sin demandas, Henri VATRÉ, aŭ ĉar ĝin kreis verkistoj el tre diversaj landoj kaj kulturoj...? Kaj li daŭrigas:

A.- Kiel en naciaj beletroj, ni rimarkas du tendencojn en la kreado de niaj noveloj. Kelkaj el tiuj parencas al fabeloj: la aŭtoro eliras el ideo kaj aranĝas sian rakonton por trafi la deziritan efekton. Aliaj, la pli multaj, procedas el observo kaj esprimas realisman mond-rigardon. En ambaŭ specoj aperas ie-tie kaj diversgrade tono de humuro, tiu sava salo en literaturo kaj vivo...

Cl.- Kion ni rajtas esperi ĉe la sojlo de nia dua jarcento? sin demandas Henri VATRÉ, kaj li provas respondi:

A.- Unue, ke la nuna kolekto plurmaniere respondos al la primitiva, neniam satigebla bezono de la homa koro por iluzio, ravo, emocio, scivolo, kiu nestas funde de ĉiu el ni. Due, ke talentaj verkistoj daŭre kreu por nia literaturo kaj ke ilin kuraĝigu ĉiam pli granda nombro da fidelaj legantoj. (fino de la citaĵo).

Cl.- Eble nia decembra elsendaro dediĉita al la antologio **TREZORO**, instigos esperanto-grupojn rezervi momenton de siaj kunvenoj al laŭtleĝo de la prozaĵoj, kiujn ĝi proponas. Kiel vi konstatis, pluraj el ili eĉ havas la formon de humurplenaj skeĉoj ludeblaj dum renkontiĝoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND esprimas al siaj karaj geaŭdantoj bondezirojn por la nova jaro. Ĝis reaŭdo en 1991!